# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-25 sendita el Budapeŝto la 30an de junio.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Granda eĥo por EKO – 315 komunikoj

25

EKO-komunikoj jam en 2021

Jen resumo pri la komunikoj depost la fondo en julio 2013:

| Jaro | SUMO | Detale | Kongresoj |
|---|---|---|---|
| 2013 | 8 | 0, 0, 8 | Germanio, Islando |
| 2014 | 53 | 20, 16, 17 | Urugvajo, Argentino |
| 2015 | 52 | 25, 13,14 | Belgio, Francio, |
| 2016 | 39 | 20, 3, 16 | Slovakio, Hungario |
| 2017 | 36 | 16, 5, 15 | Koreio (Busan, Seoul) |
| 2018 | 25 | 20, 0, 5 | Hispanio, Portugalio |
| 2019 | 17 | 10, 0, 7 | Serbio, Finnlando |
| 2020 | 60 | 39, 0, 21 | Virtualaj |
| 2021 | 25 | 25, ?, ? | Virtualaj.. |
| | 315 | 175, 27, 103 | |

Ĝis nun la rekorda jaro okazis tra 2020 pro la efiko de la pandemio – subite ĉio devis okazi virtuale. La pinto por dumkongresa raportado okazis en 2014 pro la foreco de la kongresoj en Montevideo kaj Bonaero, tiel ke pluraj aktivegaj esperantistoj ne povis partopreni kaj devis dedistance sekvi aferojn. Rimarku, ke nur unufoje, en 2017, la Kongresoj de UEA kaj ILEI samlandis – tamen ĉiam eblis vojaĝi inter ili. UEA kaj ILEI daŭre subtenas la unikajn ilustritajn komunikojn, kies ĉefa celo estas la konigo kaj stimulado de forta loka kaj landa agado.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean





**ENHAVO**


- KomunikEKO
- ILEI-simpozio
- Edukado: Hispana, Pola, Barata.
- BET-uloj bonvenaj!
- Vinilkosmo

# Denove simpozio dum la Kongreso de ILEI

La 54a Kongreso de ILEI okazos inter la 7a kaj 14a de aŭgusto. Kiel jam tradicie, tra du kongresaj tagoj okazos altnivela simpozio. La Kongreso kaj la Simpozio devas tamen okazi virtuale.

Jen la nuna stato de la subtemoj (prelegblokoj):

1. Komunikado en multlingvaj edukmedioj – problemoj kaj solvoj
   Ĉefpreleganto: Charles Ligan, Université d'Abomey-Calavi (UAC), Benino
   Diskutanto: A. Giridhar Rao, Azim Premji University, Barato

2. Esperanto en supera edukado – mitoj kaj faktoj
   Ĉefpreleganto: Ilona Koutny, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu (AMU), Pollando
   Diskutanto: Adel Rafii, University of Isfahan (UI), Irano

3. Utiloj kaj defioj de neĉeesta lernado kaj instruado
   Ĉefpreleganto: Manuel Pancorbo, Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED), Hispanio; Diskutanto: anoncota

4. Survoje al virtuala Esperanto-universitato – inter revo kaj realo
   Ĉefpreleganto: Vicente Manzano-Arrondo, Universidad de Sevilla (US), Hispanio
   Diskutanto: Elisée Byelongo Isheloke, University of Cape Town, Sud-Afriko.


Mankas pliaj prelegantoj. Necesas nun turni nin al konkretaj homoj instigante ilin kontribui al simpoziaj prelegoj kaj diskutoj tiel, ke la simpozio fariĝu energikolekta kaj pluinspira haltejo survoje al Esperanto-universitato, koncentrita al konkretaj plupaŝoj sur tiu vojo pli ol al belsona akademia traktado de la proponitaj temoj.

**Kontribuontoj** de la simpozia programo **ne devas** pagi la simpozian nek la kongresan kotizon.

Se vi volas kontribui, turnu vin al Radojca Petroviĉ, radojica.petrovic.rs@gmail.com.

# La hispanlingva Eo-kurso bele progresas

La virtuala kurso por hispanlingvanoj sub gvido de instruistoj, organizita de Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) kun apogo de UEA kaj TEJO, al kiu, kiel ni anoncis en pasinta Bitbulteno, Hispana Esperanto-Federacio kontribuis, rezultis tre sukcesa: la kurso havas 515 lernantojn, el kiuj 33 vivas en Hispanio. El tiuj 233 loĝas en Kolombio, 73 en Meksiko, 34 en Argentino, 27 en Ekvadoro kaj 24 en Peruo. La kursoj pluiras, do finaj informoj ankaŭ ne haveblas. Sed iru al la admirinda retejo: https://datastudio.google.com/u/0/reporting/70403291-03be-4c0b-bf16-3eb84e93fbc3/page/wwRHC.




El la kursanoj, ĉ. la duono jam havas ian kapablon kun la lingvo (eble iuj sekvis la kurson en 2020).

El la retejo ni ĉerpas la grafikaĵon pri la aĝ-distribuo. Ĝuste tia, kiun UEA urĝe bezonas!

Laŭ Bitbulteno 74 de Hispana Eo-Federacio.

# Pola plulernado

La unujara instruista trejnado estos nur en la fina (t.e. 3a jaro) de la nun komenciĝanta 3-jara studado.
Ni atendas ankoraŭ aliĝantojn ĝis la 1a de augusto. Eluzu la lastan eblecon!
Informoj en interl.amu.edu.pl.
Instige

Ilona Koutny
gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

## Sud-barataj kursoj allogas bonan nombron da studentoj


Informas **Syam Sundar Pal** <pssundar.11@gmail.com> ke Dhruba Chand Haldar College (DCHC) kunlabore kun FEB-Kalkato organizas mallongan kurson kiel Kromkurson. Sovona Ghosh, mia studentino kaj nun la fakestro de tiu kolegio estas la organizanto de tiu programo. Krom Sovona, A.K.Nandi, Samaresh Chakraborti kaj mi instruos tie. Mi jam faris la instruprogramon kaj sendis ĝin al aliaj 3 instruistoj por diskutado.

Fine 175 gestudentoj aliĝis kaj ni devis enlistigi la gestudentojn en du grupojn, A & B (90 +85). Ni sukcese realigis la klasojn kaj la unua tago estis destinita por enkonduka parolado. Estis decidite, ke S.S.Pal kaj Ajoy Kumar Nandi instruu la grupon A, kaj Sovona Patronobis kaj Samares Chakraborti la grupon B.

## BET 2022 en Klaipeda

Dum du sinsekvaj jaroj (2020 kaj 2021) pro la koronvirusa pandemio ne povis okazi la tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Post ĉi tiu paŭzo Litova Esperanto-Asocio (LEA) okazigos la 56an BET en la havenurbo Klaipėda la 9-17an de julio 2022. Legu pli en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto

https://sezonoj.ru/2021/06/bet-97




## La novjorka oficejo fidele komunikadas

Legu en la alkroĉaĵo la version en Esperanto de ĝia trilingva komuniko numero 52.




## Vinilkosmo

Subtenu tiun unikan muzikan spronilon, kiu espereble kontribuos al AMO 75.

https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html

Vizitu ilian kvarlingvan retejon kaj aliĝu al ilia abonkluboj por ricevi proponojn de tuj valora institucio!

========= vortoj: 730 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.